

multaj jaroj surpasis la landon, ŝajnis almenaŭ strange, ke glacia malvarmo ne degelis pro flamo de l'koro, kiu portis sian senfinan amon tra la tuta planedo kaj senmortigis sian amatan.

... Nomu novan kontinenton per mia nomo. Donacu al mi peceton de la mondo. Donacu al mi almenaŭ etan insulon. Eĉ ĝi estu ne insulo, nur roko en Pacifiko !

Kial ŝi naskiĝis tiel malfrue ? En la XX^a jarcento ne restis blankaj makuloj sur la mapo. Longen kaj krucen estas esploritaj ĉiuj kontinentoj, malkovritaj ĉiuj insuloj. Ĉiuj rokoj, ĉiuj subakvaj rifoj estas metitaj sur la mapon. Sed Andreo ridas kaj diras ke ŝi estas stranga, ke ĉio ĉi estas — infanaĵa. Kial do li ne komprenas ! Ŝi ja ne bezonas tiun teron en malvarma antarktiko. Ne. Ŝi bezonas nur la koron. Ĝi estu granda-granda. Kaj ĝi batu same forte, same subtile, same fidele.

... Ili ne ekamis unu la alian ĉe l'unua rigardo. Tio venis nerimarkite. Ili kune kreskis, kune lernis en la lernejo. Sur la sama benko kun ŝi Andreo ne volas sidi ; por neniu trezoroj. Ili sidis en diversaj anguloj de la klaso, sed iris en la lernejon kune. Kune ili ludis. Oni ilin moknomis gefianĉoj. En ilia korto knabinoj amikis kun knaboj, kaj dum maloftaj neĝaj tagoj oni ludis militon kontraŭ la knaboj el najbara korto, la knabinoj preparis neĝbulojn. Unu tagon Andreo trafis en malamikan ringon. Retiriĝante kun pafoj, li atingis sian pordon, sed la malamikoj persekutis lin laŭspure. Kaj Zin-

jo, malviva pro timo, ĵetis pezan glacieron en la lampon subplanke. Aŭdiĝis surdiga tondro, tintante laŭte, falis pluvo da splitoj, kaj poste subite iĝis silento kaj mallumo. Andreo sukcesis malaperi.

Kelkiam ili kune preparis hejman taskon. Zinjo faris ĉion rapide kaj malakurate, facile solvis komplikajn matematikaĵojn, mokante malrapideman Andreon. Kaj li ŝatis ĉion fari solide kaj fundamente, en liaj kajeroj, plenigitaj per rektaj linioj de lia ronda skribmaniero, mankis forstrekaĵoj, kaj paŭzoj. Fininte la taskojn, ili grimpis sur la grandan kanapon ĉe la fenestro kaj malfermis la antikvan geografian atlason. Ili vojaĝis pasie kaj ravite. Trankvila malrapidema Andreo flamiĝis. Ili konstruis eksterordinarajn ŝipojn, subakvajn boatojn, piede krucis meridianojn kaj paralelojn. Ĉiuj romanoj de Jules Verne, Jack London, Kaverin, Kazancev interplektiĝis en iliaj revoj. Kaj jen foje, navigante al la Suda Poluso ili malkovris la Landon de reĝino Maud. Tiel naskiĝis la fabelo.

La amo enradikiĝis en ili nerimarkite. Ili tiam jam finis la lernejon kaj intervidiĝis malofte. Zinjo lernis en la kurso de medicinaj flegistinoj ; Andreo foriris navigacian lernejon. Ili renkontiĝis ĉe la parka heĝo vespere antaŭ la Nova Jaro. Iĝis klare, ke ili bezonis la renkonton, ke ĉiu el ili sentas mankon de la alia. Ili ne iris al novjara festeno, sed la tutan varman Nigramaran novjaron nokton promenis en la urbo. Ili ion diris, sed ne rememorus, kion. Kaj tio eĉ ne gravis.

(Daŭrigota).

